*VERDA STELO-INSIGNO*, metala, sur blanka fono, butono aŭ broĉo, havebla de la Centra Oficejo de EANA. Prezo: 65c afrankite.

34-a *UNIVERSALA KONGRESO* okazos en Bournemouth, Anglujo, 6-13 Aŭgusto, 1949. Ĝis la 10-a de Januaro aliĝis 865 kongresanoj el 26 landoj. Kongres-kotizo, \$8.00 Aliĝiloj haveblaj de EANA.

*REAL PHOTOS IN STAMP FORM:* They will personalize you, warmly, intimately, in a modern way. Send us any size photograph or negative. Your photo will be returned unharmed. Black and white, 100 for \$2.00; Color toned, 100 for \$2.50. Send your order to: *Joseph Leaby, 1754 Lanier Place, N. W., Washington 9, D. C.*

*FREE LEAFLETS available from EANA:* The Central Office has a good supply of the little envelope stuffer "For Better International Understanding," which members of EANA may receive for their promotion work among friends, teachers, clubs, important persons and organizations. *Send your request now!*

## ANTAŬ 56 JAROJ

Ni represas partojn el Esperanto-letero skribita en la jaro 1893. Ĝi estas interesa historia dokumento pro ĝia enhavo kaj pro la personoj koncernataj. *Profesoro A. Dombrovski*, unu el la unuaj Esperantistoj en Rusujo, kaj pioniro inter litovoj, sendis ĝin al *S-ro Richard H. Geoghegan*, verkinto de la unua Esperanto-lernolibro en angla lingvo, kaj pioniro en Britujo kaj Usono. Profesoro Dombrovski estis en tiu tempo ekzilito de la cara registaro kaj vivis en Centra Rusujo. S-ro Geoghegan estis ĵus transloĝinta de Britujo al Usono.

Kion vi skribis pri la sociala stato de Norda Ameriko, ŝajnas al mi tro unuflanke pentrita. Mi scias, ke la Unuigitaj Ŝtatoj ne estas ia absolute ideala regno. Sed mi ankaŭ scias, ke la absolute ideala regno troviĝas nenie sur la globo tera. Tia regno ekzistas sole *in posse* (en ebleco), kiel diras la filozofoj, sed *in esse* (en realeco) ĝi eble neniam efektiviĝos en ĉi tiu mondo. La absolute ideala regno estas limo, al kiu la homaro penos ĉiam alproksimiĝi, sed ĝin tute atingos neniam. Tial en la homa parolo la ideala regno nominda estas nur tiu, kiu el ĉiuj aliaj teraj regnoj plej alproksimiĝas al la idealo. Elirante el tiuj ĉi principoj, *mi opinias, ke la Unuigitajn Ŝtatojn de Norda Ameriko oni povas nomi regno ideala*, ĉar, kvankam ili havas siajn malbonajn flankojn, tamen en ili ĉiu aparta homo posedas plej multe da rajtoj kaj ĉiu pozitiva homa forto povas tie trovi la necesan punkton de almeto, ĉar tie oni povas ĉiam elserĉi la konvenajn kondiĉojn por la utila laborado al la komuna bono de la socio, kion ĉi en nia malnova mondo vi ne ĉie trovos. . .

Krom tio, kvankam la nuna ordo de via nova patrujo ne estas tute perfekta, tamen ĝi povas senbare perfektigi, ĉar kontraŭ ĉiuj malbonaĵoj oni povas publike paroladi kaj proponi la konformajn rimedojn por ilia tuja forigo, alivorte oni havas la kondiĉojn por sukcesa batalado kontraŭ socialaj malbonaĵoj, kio ankaŭ en nia "bone ordigita" Eŭropo ne ĉie estas trovebla.

## AMERIKA ESPERANTISTO

Vi skribas, ke la popolamaso en Ameriko estas turmentata per riĉeguloj, kaj ke la laboristoj tieaj estas ĝemantaj. Mi volonte kredas tion ĉi kaj tre bedaŭras. Sed aliflanke mi petas vin ekmemori, ke en nia "kristamema" Eŭropo ekzistas tutaj nacioj, kiujn oni sisteme pereigas kaj al kiuj eĉ ĝemi estas malpermesate! . . .

Mi konatiĝis kun Volapük, kiam mi estis lernanta teologion en Kovno. La profesoro de la seminario, Prelato A. Voronoviĉ, montris al mi novan lernolibron de Volapük. Traleginte ĝian antaŭparolon, mi estis ĉarmita, kaj kun grandega intereso mi komencis trarigardadi tiun ĉi "tutmondan" lingvon. Sed bedaŭrinde malgraŭ tio, ke mi pli malpli komprenis 12 lingvojn, en Volapük mi povis nenion kompreni, ĝis mi rigardis en la vortaron. Mia unua fervoro rapide malvarmiĝis. . . .

Post tri jaroj mi konatiĝis kun Esperanto. Mi eksciis pri ĝi el gazetoj, kiuj mokante anoncadis "ankoraŭ unu lingvon internacian". Malgraŭ tiuj ĉi mokadoj mi aĉetis la unuan broŝureton pri Esperanto kaj, trarigardante ĝin, tuj ekvidis, ke preskaŭ ĉio en ĝi estas por mi komprenebla sen ia lernado. Ju pli mi ĝin lernis, des pli mi konvinkiĝadis, ke tiu ĉi sistemo estas inda fariĝi lingvo tutmonda. Mi rakontis pri Esperanto al kelkaj el miaj kolegoj en la akademio, kaj ili tute konsentis kun mi. De tiu tempo mi fariĝis Esperantisto. Mi trovis en Esperanto preskaŭ ĉiujn ecojn, kiujn devas havi lingvo tutmonda: facilecon, naturecon, bonsonecon, uzeblecon por ĉiuj celoj — ne sole por komerco, sed ankaŭ por la scienco kaj por la poezio. Krom tio mi trovis, ke ĝi estas vere filozofie konstruita. . . .

El via letero mi vidas kun plezuro, ke via opinio pri Esperanto estas la sama, kvankam vi alvenis per alia vojo ol mi al tiu ĉi opinio.

—A. Dombrowski.

---

SEP FRATOJ, de Aleksis Kivi. Tre interesa libro, en modela stilo, pri vivo en Finnlando. *Bindita*, \$3.50, *afrankite*.

## MARTO

HUGH IRVIN KEYES

*(Facila poemo pri la sezono, verkita de la iama poet-laŭreato de E.A.N.A. S-ro Keyes ĉiam verkis en tre simpla kaj ritma stilo. Liaj poemoj por junuloj estas elstaraj.)*

Profetoj diradas admone:  
(Ĝin aŭdu kun kredo aŭ rido)  
"Se marto envenas leone,  
Eliros ŝi kiel ŝafido."

Jen marto — ŝanĝema monato  
De hele florantaj krokusoj!  
(Krom tio, ĝi estas la dato  
Por febro printempa kaj tusoj.)

En marto la birdoj revenas;  
Muzike pepadus la ranoj;  
(Sed marta aero entenas  
La semojn de gravaj malsanoj.)

Ĉu marto al sporto instigas?  
"Ha, tie ja estas la froto!"  
Nin tiu monato pensigas  
Pri neĝ-degelaĵo kaj koto.

La marto de niaj vizioj! —  
Ĝi montras sin post analizo:  
Miksaĵo el junaj folioj  
Kun grip-suferado kaj ftizo.

Ja marto pasante profetas,  
Aprilo laŭvice plenumas,  
Ĝis fine naturo ridetas  
Kaj vigle abeloj ekzumas.

## KANADA INFORMO

*En la provinco Manitoba troviĝas nova Esperantisto kaj EANA membro, R. C. Palmer. S-ro Palmer estas specialisto pri fingro-markado. Li ĵus fariĝis membro de la Subtena Komitato de EANA, kaj regule donacas ĉiumonate. Nian dankon al nova, helpema samideano.*

*Charles Roy MacDonald en Montreal informis nin ke li intencas traduki kelkajn foliojn de EANA france, por uzi inter la franc-kanadanoj. EANA nun havas francajn lerno-librojn kaj vortarojn por la utilo de niaj franc-kanadaj amikoj. Kiuj aliaj kanadanoj helpas al ni pri la problemo de tradukado kaj presado por Franc-Kanado?*

*En la Universitato de London, Ont., la nova libro "Esperanto: The World Interlanguage" staras fiere sur la breto rezervita por novaj libroj. S-ano Raymond Canon donacis la libron al la tiea biblioteko.*

*Koran dankon EANA ŝuldas al siaj kanadaj membroj, ĉar ili tre lojale respondis al la Januara Bulteno. Kompare al la nombro da membroj en Kanado, ni povas raporti, ke de tiuj membroj venis la plej granda procentaĵo da membrecoj. Ni invitas la membrojn en Kanado sendi al ni informon pri ilia agado por Esperanto, por ke ni povu publikigi plenan raporton en AĖ.*

*Vigla juna samideano en Montreal estas George Novotny, noveveninte al Kanado de Ĉekoslovakio. Georgo aktive partoprenis la junular-Esperanto-movadon en tiu lando, sed nun ĝojas esti en la nova mondo.*

*Vizitanto de Anglujo helpas la progreson de Esperanto en Ameriko! En Brantford, Ont., F-ino E. Garraway, dum kelkmonata vizito faris paroladon antaŭ la Virina Klubo, kaj tiel sukcesis interesi diversajn membrojn komenci la studadon de Esperanto. Ŝi ankaŭ tuj fariĝis membro de EANA. Sinceran dankon pro tiu bona laboro.*



## ESPERANTO-KRONIKO

*Radio-amatoroj*, en Usono kaj tra la mondo, atentu! Se vi parolas Esperante kaj povas uzi ĝin en viaj radio-dissendoj, sendu tiun informon al *S-ro George W. Bailey, Jr., RFD, Wilton, New Hampshire, U.S.A.* Li deziras kontakti Esperantistajn radio-amatorojn, por aranĝi dissendon en Esperanto.

*La Esperanto-Societo de Detroit* havis du gastojn en sia kunveno, 14 Marto, 1949: *D-ro W. Solzbacher* faris paroladeton pri la nuna stato de la movado en Nord-Ameriko, kaj *S-ro Gustav Pietsch*, unu el la estroj de la laborista movado en Berlino, raportis pri la Esperanto-movado en Germanujo. *S-ro Pietsch* venis al Ameriko por dumonata restado laŭ invito de la Usona registaro. Li estis en Detroit por studi la laboron de la grava sindikato UAW (Unuigitaj Aŭtomobil-Laboristoj).

*En Cleveland, Ohio*, la loka Esperanto-klubo organizis novan Esperanto-kurson en Fenn-Kolegio. Sub la lerta gvidado de instruisto *Charles Simon*, la nova kurso kontentige progresas. *George Wagner*, antaŭnelonge sendis trafan flugfolion al novaj kaj malnovaj membroj kaj amikoj de Esperanto en la Klevlanda regiono por vigligi la lokan Esperanto-grupon.

*S-ro H. M. Jones* de Michigan informis nin, ke li instruas Esperanton al malgranda grupo en sia lernejo. La loka gazeto aŭdis pri la grupo kaj presis bonan artikolon pri ĝia studado.

*Nova Esperanto-Kurso en Sloan, Nevado*, okazas en la elementa lernejo, sub gvidado de instruisto, *Mae Stensil*. F-ino Stensil informis nin, ke la kurso kunvenas ĉiusemajne. La geknaboj plejparte parolas hispane tie, kaj do trovas Esperanton facila kaj simila al sia hejma lingvo. F-ino Stensil diris, ke ŝi trovis la studon de Esperanto tre utila en la instruado de gramatiko.

## ESPERANTO-KRONIKO

*Kolegio "Rollins"*, en Winter Park, Florido, donis postmorte specialan premion por nia antaŭa Prezidanto, *Prof. Edwin L. Clarke*. Ĝi estis la "Algeron Sydney Sullivan" Medaliono pro elstara karaktero. Anonco pri la premio okazis en solena kunveno de la Kolegio en Februaro.

*D-ro Herbert Howe*, specialisto en tera magnetismo, kaj unu el la sciencistoj kiuj vizitis la antarkton kun Admiralo Byrd, komencis antaŭnelonge la lernadon de Esperanto. En Januaro, li skribis al la Centra Oficejo: "En mia laboro, malhelpas min la kreskanta tendenco uzi diversajn lingvojn. Mi komencas la studon de Esperanto en la espero, ke tio eble helpos en la solvo de niaj problemoj." En Februaro, D-ro Howe faris paroladon pri Esperanto antaŭ kolegoj de la "Carnegie" Geodezia Laboratorio. Al tiu laboro ni esperas plenan sukceson.

*Esperanto-Kurso por junuloj* en la 8-a studjaro de la Publika Lernejo en Cass City, Michigan, komenciĝis antaŭnelonge. *Harold Oatley*, kiu estas Esperantisto dum multaj jaroj gvidas la programon.

En la "*Townsend Tempo*", gazeto de Townsend, Mass., aperis lastatempe redaktista artikolo pri la internacia lingvo, Esperanto. Kaj kial ne? La lertaj kaj spertaj geredaktistoj de tiu gazeto estas *Gesinjoroj E. G. Cann*, ambaŭ membroj de EANA. S-ino Cann estas la filino de nia amata pioniro kaj konstanta subtenanto, *S-ino Flora Wyman*. S-ino Wyman lernis Esperanton en la plej fruaj tagoj de ĝia alveno en Usono — kaj dum la jaroj restis la plej fidela helpanto de EANA.

*Esperantlingvaj presadoj pri Danujo* estas haveblaj senpage de Turistforeningen for Danmark, Bernstorffsgade 8, Kobenhavn 5 (faldprospekto "Danlando") kaj de Turistforeningen for Kobenhavn, Bernstorffsgade 8, Kobenhavn 5 ("Bonvenon al Kopenhago!").

## ESPERANTO-KRONIKO

*Bruno Beckman* de Rochester, Minn., raportas, ke de tempo al tempo li daŭrigas la instruon de Esperanto al diversaj individuoj en sia lernejo, kiuj interesiĝas pri Esperanto.

*Multaj katolikaj gazetoj* en Usono lasttempe menciis Esperanton, represante informojn de la NC-Gazetarservo, Washington, kaj de la CIP-Gazetarservo, New York, pri la libro "Esperanto — The World Interlanguage", pri la decido de la Roma Komitato por la Sankta Jaro 1950, publikigi gvidlibron kaj informilon en Esperanto, kaj pri katalika Esperanto-kunveno en Salzburg, Aŭstrujo, sub prezido de Ĉefepiskopo A. Rohrer.

*La Societo de Britaj Esperantistaj Geinstruistoj* aranĝos Someran Lernejon en Bletchley, Buckinghamshire (ne malproksime de Londono) post la Universala Kongreso de Esperanto. Adreso: F-ino V. C. Nixon, 183 Woodlands Park Road, Burnville, Birmingham 30, Britujo.

*Eksterlandaj Esperantistoj* nuntempe tre ofte venas al Usono kaj Kanado. Preskaŭ ĉiutage la Centra Oficejo ricevas leterojn kaj vizitojn de Esperantistoj de aliaj landoj. Nun troviĝas en Usono samideanoj de Francujo, Argentino, Kubo, Belgujo, Germanujo, Nederlando, Anglujo, Svedujo kaj Ĉinujo. Diversaj "DP"-personoj, kiuj trovas novan hejmon en niaj landoj de libereco, skribis al ni pri sia alveno: Ukrainoj, Litovoj, Ĉekoslovakoj, ktp. Al ili ĉiuj ni diras: Bonvenon! Studu bone la kutimojn, morojn, homojn, de via nova hejmlando, kaj laboru kun ni por la progreso de Esperanto en Nord-Ameriko.

*Warren Ewing*, instruisto en McMinnville, Oregon, disvastigas informon pri Esperanto kie ajn li trovas sin. Li instruis en McMinnville nur dum kelkaj semajnoj, kiam li jam iniciatis Esperanto-kurson tie kaj faris paroladojn antaŭ la geinstruista grupo de la altlernejo.

## ESPERANTO-KRONIKO

*En Dublin* okazos Postkongreso Esperantista de la 14a al la 20a de Aŭgusto 1949, kun interesaj ekskursoj al belaj partoj de Irlando. Adreso: Esperanto-Oficejo, Bothar Glasard 16, Dublin.

*Walter S. Ryan*, studas nuntempe en la Internacia Kolegio de la Y.M.C.A. en Springfield, Mass. Li jam faris diversajn paroladojn pri Esperanto en tiu regiono kaj interesas profesorojn kaj studentojn. Li raportis pri interesa sperto kiam li faris demandon al S-ino Eleanor Roosevelt pri ŝia opinio pri Esperanto kiel internacia lingvo. S-ino Roosevelt respondis: "Nu . . . Mi . . . neniam interesiĝis pri Esperanto en tiu rolo . . . sed . . . Mi interesiĝas pri la tuta lingva problemo. Mi . . . ah . . . scias pri Esperanto, kaj multaj amikoj jam skribis al mi pri ĝi, sed mi ne opinias, ke ĝi estas la solvo de nia problemo. Ni devas peni pli por kompreni la mensojn de aliaj popoloj kaj iliajn manierojn de pensado —". Je tiu punkto, S-ino Roosevelt, iom hezite, komencis paroli longe pri la lingvaj malfacilaĵoj, kiujn ŝi spertis — speciale kun la rusaj delegitoj. Fakte, ŝi tiel nur emfazis la sugeston de sia demandanto, car ŝi nekonscie pruvis ke nur Esperanto povas esti la vera solvo. Diversaj neesperantistaj aŭskultantoj poste komentis same pri la rezulto de ŝia "rond-vojado" ĉirkaŭ la kernon de la lingvo-problemo.

*En religiaj rondoj* diversaj samideanoj trovas oportunon por paroli pri Esperanto. Lastatempe, *S-ro E. G. Dodge* prezentis prelegon antaŭ grupo en la "All Souls" preĝejo pri "La Religio de D-ro Zamenhof". *S-ino Mabel Vicary* parolis en la Baha'i grupo de Lansing, Mich, pri "Mondlingvo por Pli Bona Interkompreno". En Balboa, Panama Canal Zone, *S-ro Van Allen Lyman* prezentis longan prelegon pri Esperanto kaj ĝia progreso en la nuna mondo, antaŭ la "Unitarian Church" tie.

# EL LA HISTORIO DE AMERIKA ESPERANTISTO

BABI LE MULO

[Unua Parto, kun tabelo pri redakcioj]

---

<i>L'Amerika Esperantisto</i>		(redaktoroj)
1906	Oklahoma City	Arthur Baker
<i>Amerika Esperanto-Jurnalo</i>		
1907	Boston	John Fogg Twombly
1908	New York	David H. Dodge
<i>Amerika Esperantisto</i>		
1907-10	Chicago	Arthur Baker
1911-13	Washington	Ivy Kellerman Reed
1913-22	West Newton, Mass.	C. H. Fessenden Ernest F. Dow
1922	Cambridge, Mass.	A. P. H. Rollason
1922-27	Boston	Norman W. Frost Herbert M. Scott Isabel M. Horn G. Winthrop Lee
1927-29	St. Paul	Charles W. Barnes Joseph J. Burita
1929-33	Fort Lee, N. J.	J. J. Sussmuth
1933-34	Washington	Thomas F. Gaines
1934-42	Washington	Joseph Leahy
1943	Detroit	Mabelle L. Davis
1944-	New York	G. Alan Connor

---

“Unu el la amikoj de la aŭstra Imperiestro diras, ke li abomenas Esperanton, ĉar la anarkiistoj, tiuj friponoj, pere de gramatiko kaj vortaro, povas kompreni unu la alian tra la tuta mondo, post nur proksimume ses lecionoj. Tio estas vera, sed per la sama logiko tiu sinjoro povus abomeni fervojojn, ĉar ili ebligas vojaĝadon de unu lando al alia eĉ al anarkiistoj. Ĉiu inteligenta persono komprenos, ke, se

## AMERIKA ESPERANTISTO

Esperanto povas esti lernata en ses lecionoj sufiĉe bone por fariĝi interkomprenigilo inter du homoj de tute malsamaj gepatraj lingvoj, ĝi meritas esti uzata ne nur de anarkiistoj, sed ankaŭ de diplomatoj, misiistoj, brikportistoj kaj reĝoj. Se la aŭstra eminentulo estas sufiĉe juna kaj sana, li povas esperi vivi ĝis la tempo, kiam tia ĝenerala uzo de Esperanto estos realeco.”

Ĉi tiu artikoleto, tradukita el la dua numero (Novembro 1906) de “L’Amerika Esperantisto, estas tipa ekzemplo de la vigla maniero, en kiu S-ro Arthur Brooks Baker, tiam loĝanta en Oklahoma City, redaktis la gazeton, kiun li fondis en Oktobro 1906. Jen alia ero el la sama numero: “Iu Kalifornia Esperantisto, skribante al ‘Amerika Esperantisto’, demandis, kion ni pensas pri tertremoj. Konfidence mi respondas, ke ni opinias, ke eĉ la skuo en San Francisco estas nenio kompare al tio, kio okazos, kiam kelkaj usonaj universitatoj forĵetos sian pezan ŝarĝon de mortintaj lingvoj por oficiale akcepti la plej vivantan lingvon en vivanta epoko: Esperanton.”

“L’Amerika Esperantisto, Monata Gazeto pri Esperanto, la Internacia Lingvo”, havis ambician kaj grandiozan programon: “La celo kaj intenco de L’Amerika Esperantisto estas, havigi al la lernantoj kaj uzantoj de la lingvo, Esperanto-gazeton je la okcidenta marbordo de la Atlanta Oceano. Tiel rapide, kiel ili povas esti kompilataj kaj presataj, aperos mallongaj, sed kompletaj gramatiko kaj vortaroj angla-Esperanta kaj hispana-Esperanta, ĉar la intencata agadkampo de ĉi tiu gazeto etendiĝas de la Arkta Oceano al Kapo Horn. Abonantoj en eŭropaj kaj aziaj landoj tamen ne estos traktataj malpli favore, escepte kiam la poŝtaj elspezoj igas tion necesa.”

Kompreneble tiu hispana-Esperanta vortaro anoncita en la unua numero de AE neniam aperis en Oklahoma City aŭ ie alie en nia lando, sed la gazeto fariĝis vigla kaj efika propagandilo de Esperanto, ne “de la Arkta Oceano al Kapo Horn”, sed en tuta Usono kaj en la anglalingvaj

## AMERIKA ESPERANTISTO

partoj de Kanado. Cetere S-ro Baker ŝajne ne sciis, ke en tiu tempo jam ekzistis tuta serio de Esperanto-gazetoj en la Okcidenta Duonsfero. La plej bona el ili, "Antaŭen, Esperantistoj", aperis regule ĉiumonate en Lima, Peruo, de Julio 1903 al 1916. De la unua Esperanto-gazeto en Ameriko, "El Esperanto", aperis nur unu numero en Valparaiso, Ĉilio, en Majo 1901. Ankaŭ jam aperis (aŭ estis aperintaj kaj malaperintaj) "L'Espérantiste Canadien" (Kanado, Aŭgusto-Decembero 1901), "La Lumo" (Kanado, 1902-04), "La Gazeto" (Portoriko, 1906), "Ĉilio Esperantista" (Ĉilio, 1903-04), "Meksika Lumturo" (Meksiko, 1904-05), "Esperanto-Skarabaro" (Kostariko, 1906), "Moderna Idiomo" (Paragvajo, 1905), "Verda Radio" (Gvatemalo, 1905), kaj "Centramerika Esperantisto" (Gvatemalo, 1906). "Amerika Esperantisto" do estis nur la 12-a inter la gazetoj aperintaj "de la Arktra Oceano al Kapo Horn", sed ĝi estis la plej vigla, la plej bela kaj la sola, kiu vivis ĝis nun, atingante la maturan aĝon de 41 jaroj. Estante la dua inter ĉiuj Esperanto-gazetoj aperintaj seninterrompe ("Brita Esperantisto" estas unu jaron pli aĝa), AE ankoraŭ tute ne estas laca kaj dormema, sed esperas duobligi aŭ triobligi sian vivon sen perdo de energio kaj intereso.

[DAŬRIGOTA]

## THE LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES ORDER YOUR LINGUAPHONE FROM E.A.N.A.

You can learn *ESPERANTO*, or any of 27 other languages, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through E.A.N.A. for benefits to both yourself and your Central Office.

The regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$50. Special favorable arrangements for Members, Teachers and Clubs. Also *Canadian Members* will likewise receive favorable arrangements, and pay in Canada to Canadian agency without customs duty, etc. Write to us for details of our special *Linguaphone* offers.

**Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.**

## LA ESPERANTO-STUDANTO

### La Nova Modo

*Edzino:* Kara mia, mi ĵus revenis de la urbo.

*Edzo:* Ho, jes... ĉu vi havis interesan viziton?

*Ŝi:* Mi ne vizitis iun. Mi iris pri speciala afero. Nu... kara... ĉu vi ne rimarkas ion?

*Li:* H-m-m? Ho, jes!... Kio okazis al via jupo? Ĝi trenas preskaŭ al viaj maleoloj. Ĉu akcidento en la aŭtobuso? Kia embaraso por vi.

*Ŝi:* Ĉi tio estas la nova modo. Ĉu mi ne aspektas bele?

*Li:* Ĉu nova modo, kara? Kun tiaj longaj jupoj? Ho, mia kara, tio estis la modo jam antaŭ 30 jaroj.

*Ŝi:* Ho, ne... je tiu tempo ne estis tute same. Rigardu, jen bele faldita jupo... je eleganta distanco de la planko.

*Li:* Ha... kaprico de la virino! Ĉu ankaŭ mi devas reveni al la modo de antaŭ 30 jaroj? Alta kolumo, strikta pantalonono? Ne, mi rifuzas. Mi restos ĝuste kiel mi nun estas.

*Ŝi:* La modo por viroj ankaŭ iom komencas ŝanĝiĝi. Mi vidis brile koloritajn ĉemizojn en la magazeno hodiaŭ.

*Li:* Nu... mia kara edzineto... en via nova modo... staru tie momenton kaj atendu. (Li eliras, sed baldaŭ revenas.) Jen, vi vidas, estas fotografajo de vi... en la jaro 1919... kaj ĝi montras vin en kostumo tute same kiel tiu, kiun vi nun surhavas! Kia bela *nova modo*, ĉu ne?

### The New Style

*Wife:* My dear, I just returned from the city.

*Husband:* Oh, yes... did you have an interesting visit?

*She:* I didn't visit anyone. I went for something special. Well... dear... Notice anything?

*He:* H-m-m? Oh, yes!... What happened to your skirt? It hangs almost to your ankles. An accident in the bus? What embarrassment for you.

*She:* This is the new style. Don't I look lovely?

*He:* The new style, dear? With such long skirts? Oh, my dear, that was already the style 30 years ago.

*She:* Oh, no... it wasn't quite the same then. Look, a beautiful pleated skirt... at an elegant distance from the floor.

*He:* Ah... the whims of women! Do I also have to return to the style of 30 years ago? High collar, tight pants? No, I refuse. I shall remain exactly as I am now.

*She:* Styles for men also are beginning to change a bit. I saw brightly colored shirts in the store today.

*He:* Well... my dear little wife... in your new style... stand there a moment and wait. (He leaves, but soon returns.) Here, you see, is a photo of yourself... in the year 1919... and it shows you in a costume exactly the same as you now have on! What a lovely *new style*, yes?



---

## DEZIRAS KORESPONDI

---

*Aŭstrio.* Franz Fotinger, Kaserngasse 7, *Salzburg*. Kor.

*Bulgario.* K. Benev, Inspektoro, Ministerstwo PTT, *Sofia*. Dez. kor. pri vendado kaj interŝ. de PM, PK, kovertoj, ktp.

*Ĉinujo.* Lu Cheng Chi, P. O. Box 7, *Siangtan*, Hunan. 28-j. dez. kor., kolektas PM, fotojn kaj literaturon.

*Ĉinujo.* Charles Y. Chow, 28 Shutehli, Paoting Road, *Tientsin*. Dez. interŝ. neuzitajn PM kun tutmondo, precipe la noveldonitajn je granda kvanto. Korespondo aerpoŝte.

*Danujo.* A. Moesgaard Larsen, Samsøegade 79 *Aarhus*. Dez. kor. pri PM kaj unua-tagaj kovertoj.

*Danujo.* S-ino Agnese Hermund, Adelvej 4, *Risskov*. Kor.

*Francujo.* S-ro Paulo Loubre, Ecole de Mandirac, *Narbonne*. 40-j. instruisto dez. kor. pri filozofio, kaj interŝ. infanajn desegnojn.

*Germanujo.* Willy Balduf, Lerchenstr. 23, Kornwestheim (14a), *Stuttgart*, U. S. Zono. Dez. kor. pri ĉiuj temoj. Respondo certa.

*Germanujo.* Max Wahnschafft, Feuchtwangerstr. 10, (13a) *Ans-bach/Bayern*, U. S. Zono. Estro de lernejo dez. kor., interŝ. il. PK kaj leterojn tutmonde.

*Grekujo.* Ioanidis Konstantino, Poste-Restante, *Athens*. Tri junaj soldatoj dez. kor. kun samidean-in-oj en Usono.

*Italujo.* Ernesto Tocco, Corso Vittorio 20, *Torino*. Dez. kor. kun junaj gesamideanoj en Usono.

*Japanujo.* Nakamura Toyozo, 2408 Nakaburi Hira-kata-shi, Kitagawati, *Osaka*. Studento en komerca lernejo dez. kor.

*Kanado.* George Novotny, 379 Elm Ave. West, *Montreal*, P. Que. Dez. kor. kaj interŝ. PM kun junaj gesamideanoj en Usono. Respondo certa.

*Turkujo.* Fahrettin Gürbüz, Hasan Efendi Mahallesinde 10, (Gazi Bulvari Sokak no. 12), *Aydin*. 25-j. dez. kor. kun Amerikanoj.

*Nov-Zelando.* S-ino Ethel Rodger, 68 Hobson St., *Wellington*. 40-j. dez. kor. kun komercantinoj prefere en grandaj urboj en Usono kaj Meksiko.

*Germanujo.* Werner Flöh, Gebhardstr. 64, (17a) *Karlsruhe in Baden*, U. S. Zono. Dez. kor.

*Germanujo.* Franz Boeswald, bei A. Hemmerlein, Huttenfeldstr. 81 I, (13a) *Bamberg*, Bayern, U. S. Zono. 16-j. dez. kor.

*Anglujo.* S-ino Lilian M. Oxley, 146 Regent Court Flats, Bradford Rd., Hillsborough, *Sheffield* 6. 28-j. dez. kor.

*Japanujo.* "AE" havas multajn nomojn kaj adresojn de studentoj, instruistoj, sciencistoj en Japanujo, kiuj deziras korespondi. Petu informon laŭ via propra intereso.

## A SELECTION OF BOOKS FROM SWEDEN

Here are books of real merit, for your enjoyment, which we commend to Esperanto-readers everywhere. We select a few titles for detailed description. For a complete list of Swedish Esperanto-books see AE, Jan-Feb issue, pages 28-29.

### **"Rapsodioj: Dua, Tri, Kvara", 3 for \$1.90 postpaid.**

Compilations of best short stories, articles, essays, etc., in great variety, noted authors. Each book 5¾" x 8½", 48 pp. We list just a few items from table of contents.

#### **DUA RAPSODIO:**

Aventuroj en kongresa vojaĝo, *Nylén*; La lingvo de la laponoj, *Collinder*; La mania montgrimpulo, *Persson*; Latino kaj Esperanto, *Stenström*; La naiva kampulo, *Szilágyi*; En la naskurbo de Shakespeare, *Söderberg*; Idealo kaj realo, *Engholm*; Voltaire, ĉiam aktuala, *Svensson*.

#### **TRIA RAPSODIO:**

Kunlaboro per Esperanto, *Nylén*; Mia junaĝo en Grenlando, *Freuchen*; Optikaj lingvoj, *Collinder*; La militestro de la paco, *Backlund*; La blanka luno, *Verlaine*; Ne juĝo tro severe, *Carlander*; La artobjekto, *Čekov*; Iom pri nia tradukliteraturo, *Stenström*; Neniuj sekretoj, *Henriksson*.

#### **KVARA RAPSODIO:**

Mondmoralo, *Szilágyi*; Soneto (Shakespeare), *Kalocsay*; Nokta penso, *Li-Tai-Po*; Strangajoj el la besta vivo, *Stop-Bowitz*; Alarmo en 1945, *Bagby*; La patrino, *Liv-Dresen*; Interna ideo, *Kalocsay*; Problemoj ĉe la tradukado, *Gardman*; Kurioza historio de fluganta sentenco, *Setälä*.

### **"50 Jarojn de Esperanto (Paul Nylén)". 75c postpaid.**

An up-to-date and richly illustrated account of the Esperanto movement from Zamenhof's birth to the present time (1859-1942). In brief "book-film" manner, all outstanding events, personalities, and progress of the world Esperanto movement are described *and pictured*, in chronological sequence. It is a remarkable reference work, and contains essential facts for a full understanding of the movement. Much of it is new and different from other encyclopedic works in the past. For example, see Nylén's letter to Alice V. Morris about IALA. An indispensable book for every Esperantist — deluxe paper, art-card covers, large format 8" x 11", 64 pp, and over 100 photos and facsimilies. *Order your copy now while we have a supply at this low price.*

## MORE BOOKS FROM SWEDEN

<i>Originala Esperanta Legolibreto</i> , Widstrom, 46 pp. many little stories & essays, well recommended reader .....	.15
<i>Kudlago, la malgranda eskimo</i> , Hichtum, 40 pp. delightful story of native youth in Greenland, quite easy .....	.30
<i>Barbro kaj Eriko</i> , Schneider & Carlsson, 40 pp, il, little romance bet. Alois & Magda thru model letters .....	.25
<i>Bengalaj Fabeloj</i> , Sinha, 40 pp, three very interesting exotic fabels from India, by Hindu Esperantist .....	.30
<i>Dialogoj kaj Komedietoj</i> , Dahl, 32 pp, ten easy diverse short playlets for Esperanto meetings and courses .....	.25
<i>Bargain</i> in best possible reading and Esperanto information: <i>Dua, Tria, Kvara Rapsodioj</i> , all 3 books for.....	1.90
<i>La Esperanto-Klubo</i> , Malmgren, 48 pp, crammed with ideas for organizing clubs, programs, fun, courses, etc. ....	.25
<i>Al Toronto</i> , Engholm, 2nd ed, 93 pp, original novel of life in a Swedish industrial village, simple style .....	.50
<i>Gösta Berling</i> , Selma Lagerlöf, 552 pp, complete 2 parts in 1 de luxe cloth-bound vol., world-famed novel .....	3.00
Same volume, except bound in 3-color heavy paper .....	2.35
<i>Infanoj en Toronto</i> , Engholm, Part 1 & 2, 2 vols, 100 pp & 144 pp, remarkable story, simple style. Both for .....	1.70
<i>La Fino</i> , Count Folke Bernadotte, complete il. popular edition, account of German negotiations during war.....	1.00
<i>La Granda Aventuro</i> , & other original stories, Szilagyi, 144 pp, sprightly "Stelolibro" edition, bound volume .....	2.25
<i>La Konscienco Riproças</i> , August Strindberg, 59 pp, novel of moral conflict, by great Swedish author, only .....	.30
<i>La Ringo de la Generalo</i> , Selma Lagerlöf, 127 pp, novel, one of most brilliant works, in superb translation .....	.75
<i>Pasko</i> , August Strindberg, 88 pp, drama in three acts, famous dramatic work, translated in simple style .....	.60
<i>La Homaj Rasoj de la Mondo</i> , Nordenstreng, 212 pp, 140 il, incl. nudes, comparing characteristics all races .....	1.35
<i>Tra Sovaga Kamčatko</i> , Sten Bergman, 277 pp, richly il, life in Siberian peninsula, far northeast Russia .....	1.75
<i>Sonoj kaj Vortoj en Esperanto</i> , Paul Nylén, 40 pp, important commentary on pronunciation & wordbuilding.....	.60
<i>Kaj Ĉio Restas Penso sed Ne Faro</i> , Lakshmiswar Sinha, 15 pp, essay on understanding & human brotherhood .....	.25

Note, that when you buy books from *American Esperantist*, all profits are used to give you a better magazine and a better Central Office for E.A.N.A.

## RARE FIND IN ESPERANTO RECORDS

### A FEW "TRI-ERGON" NO. 1 & NO. 2

Of the "Tri-Ergon Foto-Electro Process" 12-inch records advertised in the Jan-Feb issue of AE, all of the eight No. 3 records, and about a dozen each of No. 1 and 2 records, were quickly sold out. Only a few of No. 1 and No. 2 remain in stock: *ten of No. 1, five of No. 2.*

During the last send-out of "Tri-Ergon" records, a few members pointed out that time and distance were against them (especially since only eight records of No. 3 were available). For orders sent in *now*, we will note your postmark date, and allow a full day extra for each postal zone distant from New York. This will apply to all orders, except that *first consideration will be given to those who order both records No. 1 and No. 2.* (Note, that we pay all packing, postage, and insurance costs.)

#### "Tri-Ergon Record" No. 1, price \$3.85 postpaid.

(1-A) *Prologo por la Dek-Naŭa Universala Esperanto-Kongreso en Danzig, 40th Jubilee.* Dramatic prologue to the Congress, by Edith Herrnsstadt-Oettingen.

(1-B) *Parolado pri la Inventaĵo "Tri-Ergon" por fari Foto-Elektro-Diskojn.* Important for its popular-science manner of presentation, using many simple scientific words. Speech by Edith Herrnsstadt-Oettingen.

#### "Tri-Ergon Record" No. 2, price \$4.35 postpaid.

(2-A) *El la Parolado de D-ro Zamenhof en la Unua Universala Kongreso de Esperanto, 1905 at Boulogne sur Mer.* There, Zamenhof presented "Preĝo sub la Verda Standardo." Speech recited by Edith Herrnsstadt-Oettingen.

(2-B) *Parolado de D-ro Edmond Privat en la 40-a Jubileo de Esperanto, Danzig* about Zamenhof, Esperanto progress, and the universal spirit of understanding. Recorded by Dr. Privat, famed Esperantist orator.

Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.